ce, kiel serioze, li parolas)--Jes.

S-ro M.—Tamen ĉio nun estas tute bona. Ĉu vi scias, mi opinias ke mi trovis la plejeblan bonan ŝercon pri Ned Sterns.

F-ino D. (vivece)—Jes?

S-ro M.—Vi scias kiel profunde li estas amvundita de Lili Sodon?

F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Nu, vi konas tiun altkreskan kuzon ŝian, kiu venadas de Philadelphia por viziti ĉe ŝi?

F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Nu, Ned invitis I,ili'n aŭdi la operon kun li antaŭnelonge, kaj ŝi skribrespondis ke ŝi jam promesis al alia.

F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Kaj kompreneble Ned vizitis la operon, ĉirkaŭspionis ĝis li vidis ilin kaj,— F-ino D. (tre interesata)—Jes? S-ro M.—Kaj li vidis ŝin kune kun ĉi tiu altkreskulo, kiun li ne konis, kaj li efektive deliris pro ĵaluzo.

F-ino D. (antaŭen kliniĝas kun la plej granda intereso, kaj distrite enmetas bombonon en la buŝon, nur ĉar ŝi okaze ekvidas ilin, tro absorbite por konsideri kion ŝi faras)—Jes!

S-ro M.—Kaj nun li estas furioza, kaj insistas ke mi iru kaj repostulu liajn leterojn. Ĉu vi ne supozus ke li mem tion farus?

F-ino D. (vivece)—Jes!

S-ro M.— Kaj la tutan tempon mi scias ke tio nur estis ŝia kuzo, kaj mi ne sciigos lin. Treege bona ŝerco, ĉu ne?

F-ino D. (dubeme)—Jes.

S-ro M.—Vi ne estas tre entuziasma. Ĉu vi ne opinias ke Ned meritas lec onon pro tia malsaĝeco?

F-ino D. (pli pozitive)—Jes.

S-ro M.—Malgraŭ ĉio, la virinoj ĉiam admiras viron ĵaluzan. Ili pensas ke tio pruvas ke li efektive enamiĝis.

F-ino D.—J-e-s?

S-ro M.—Ĉu vi ne scias ke tio estas

F-ino D. (levante la ŝultrojn)—Jes? S-ro M.—Nun vi penas min inciti. Ĉu vi ne dezirus ke via amanto estu ĵaluza?

F-ino D. (per kapoklineto kaj gesto montrante ke ŝi estas tre decidema

pri tio)-Jes.

S-ro M. (triumfe ridante)—Jen, mi tion diris. Mi sciis ke vi subtenos Ned Sterns; ĉu vi ne?

F-ino D. (post mallonga silento, dum kiu ŝajne ŝi vane penas decidi kion signifas ŝia konfeso)—Jes.

S-ro M.—Virinoj neniam estas logikamaj. Kredeble ili opinias ke ilia intuicio superas la logikon.

F-ino D. (tuj)—Jes. S-ro M.—Aŭ malsuperas. F-ino D. (sarkasme)—Jes.

S-ro M.—Ho, ne ofendiğu; vi scias ke mi ĉiam konsentas kun vi, eĉ kiam mi scias ke vi eraras. Mi ĉiam diras ke estas nur ĝentile konsenti kun virino.

F-ino D.-Jes?

S-ro M.—Jen denove mi kolerigis vin. Efektive mi ne povas elpensi kion mi faros por vin pacigi. Vi ja estas kolera, ĉu ne?

F-ino D. (malgraŭvole ridetante je

lia absurda maniero)—Jes.

S-ro M. (kun milda ekspiro)—Sed ne tre kolera, mi opinias. Mi ciam povas voligi la knabinojn pardoni min, kiam ili koleras.

r-ino D.-Jes?

S-ro M.-Nu, Mili Mejl iufoje diris, ke mi babilas tiel rapide ke neniu alia povas enigi ec unu vorton. Vi ja scias ke tio estas nevera, ĉu ne?

F-ino D.—Jes!

S-ro M.—Kaj ŝi estis kiel eble plej kolera, car mi ne permesis al si rakonti historieton; sed mi daŭre parolis, kaj si subite sin trovis ridanta kaj rideganta. Cu vi ne opinias ke si estas genre specimeno de knabino?

F-ino D. (ridante)—Jes.

S-ro M.—Tia knabino, kia devus esti metita sur scenejon, aŭ aranĝita en bildo, vi scias.

F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Nu, vi estas de tute malsimila kvalito.

F-ino D.—Jes?

S-ro M.—Ho jes. Vi scias ke Mili Mejl neniam havas ion aŭdindan por diri, kaj ŝi ĉiam interrompas, penante ĝin diri. Nu, (se vi bonvolos pardoni ke mi diras tion antaŭ via vizaĝo mem) estas granda plezuro paroli al vi, vi ciam havas tiom multe por diri.

F-ino D. (kun grandioza riverenco)

les!

S-ro M.—Ho, vi povas ridi, sed mi vere preferas paroli kun vi ol kun iu alia knabino kiun mi konas. La knabinoj estas tiel plenaj de malsaĝeco, kaj ili ĉiuj ĉiam babiladas tiajn sensencaĵojn, ke neniu prudenta viro povas toleri la kunparoladon kun ili. Ĉu vi scias, mi havis inklinon por presigi kvanton da kartoj por dissendi al miaj amikinoj, kaj la devizo-

F-ino D.—Jes?

S-ro M.—Devis esti: "Etuloj devus esti vidataj, ne aŭdataj." Ĉu vi ne opinias ke tio estas originala ideo?

F-ino D. (sarkasme)—Jes.

S-ro M.—Ho, nun vi pensas ke mi denove atakas la knabinojn, kaj vi ne aprobas. Ne koleru, ĉar mi forte deziras ke vi estu komplezema hodiaŭ. Mi venis kun speciala celo.

F-ino D.—Jes?

S-ro M.—Longatempe mi penis stimuli mian kuraĝon. Efektive mi estas terure timema, kaj mi ĉiam pli timas vin ol iun alian.

F-ino D. (Retirante sin en la angu-

lo de la kanapo, kun pli indiferenta maniero, kvazaŭ antaŭsentante ke io

grava sekvos)-Jes?

S-ro M —Jes, tio ja estas vera. Mi ciam ametis vin pli ol la aliajn knabinojn. Mi opinias ke ni konas, unu la alia, sufice longan tempon por esti tute malkasemaj, ĉu ne?

F-ino D. (preskaŭ neaŭdeble)—Jes. S-ro M. (tordante s ajn delika:ajn I pharojn, kun subita konfuziĝo)-Mi volas-tio estas, ĉu vi scias, mi estas treege sopirema pri vi.

F-ino D. (kun multe pli malfervora

tono)—Jes?

S-ro M.—Kompreneble, jes. Vi nepre scias tion. Cu mi ne invitas vin c'am la unuan por la "german"-oj? Cetere, vi ja dancas tiel treege gracie.

F-ino D.-Jes. (Si interplektas la manojn kaj rigardas en liajn okulojn

kun tre naiva mieno.)

S-ro M. (movigate maltrankvile sur la seĝo)—Kompreneble vi tion scias, kaj vi nepre komprenis kion mi celas.

F-ino D. (ridante)—Jes!

S-ro M.—Ho, vi supozas ke mi petis vin nur ĉar vi tiel bone dancas. Ne estis tio; almenaŭ tio estis nur parto.

F-ino D. (kun aspekto de sincera sed tute nepersona intereso)-Jes?

S-ro M.—Ho, Fraŭlino Dejton, mi ja volus esti certa ke vi tiel respondos al unu demando, kiel mi deziras,-sed verdire la plej facila metodo sciiĝi, estas demandi, ĉu ne?

F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Mi tute neniam estis lerta farante paroladojn. Ciam mi daŭre bab las per etaj frazaĵoj, kaj iafoje paŭzas por ke aliaj personoj enmetu vortojn, kiam ajn ili volas-

F-ino D.—Jes?

S-ro M.—Konversacio fariĝas tiel senspirite kiam ĝi estas nur unuspeca, cu ne vere?

F-ino D.-Jes?

S-ro M.—Sed mi volis demandi al vi ĉu vi- (Li ekhaltas kaj rigardas ŝin. Si ridetas kuraĝigante, kaj li daŭrigas tiel rapide kiel antaŭe.) Mi volis demandi ĉu vi edziniĝos kun mi.

F-ino D. (tre kviete)—Ne.

S-ro M.—Cu vi diras tion intence?

F-ino D.—Jes. S-ro M.-Vere? F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Kial? Tamen mi supozas ke mi ne rajtas demandi tion. Mi esperas ke vi ne ofendiĝas. Ni povos ankoraŭ resti amikoj?

F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Mi estas tiel malfelica. Cu vi estas certa ke vi tion intencas?

F-ino D.-Jes.

S-ro M.—Mi do supozas ke ne utilus insisti. Mi ne ploros pri lakto verŝeperdita. Ĉu vi ne opinias ke estas pli saĝe toleri okazaĵojn trankvile?

F-ino D. (ridetante kaj scivoleme

lin rigardante)—Jes.

S-ro M. (leviĝante)-Nu, ĉiuokaze tiu farĝo estas fine eligita el miaj pensoj. Dum la tuta vintro mi intencis peti vin. Vi estas certa ke vi ne ofend gas?

F-ino D.—Jes.

S-ro M.—Tiom da knabinoj koleriĝas, vi scias, kiam ili sin rifuzas al iu.

F-ino D.—Jes?

S-ro M.—Mi tute ne supozis ke estas tiel malfrue! Efektive mi devus esti antaŭlonge foririnta. Adiaŭ. Ne leviĝu. Adiaŭ.

(Kaj antaŭ ol Fraŭlino Dejton povas eĉ eligi adiaŭan vorton, li rapide foriras, ŝajnante tiel gaja kaj viveca

kiel ĉiam.)

(Laŭ permeso) Tradukis Herbert Harris.

#### KIAL MALSUKCESIS ANATOMIA ESPLORO

De Robert M. Bailey

En la Vermonta vilago Littledale log's du knaboj, kiuj iel enprenis en siajn kapojn la intencon fariĝi kuracistoj. Iom strange tio estis, ĉar ili estis nur lernantoj en la mezgrada lernejo, l'aj neniu el la parencoj de ambaŭ est's kuracistoj. Eble la okaza akiro de libro pri anatomio kaj fiziologio vekis ilian scivolon. Ciuokaze, dum la aliaj Littledale'aj knaboj estis ludantaj, niaj du knaboj studis la strukturon de la homa korpo, kaj la faradojn de ĝiaj organoj tiel multe kiel la libro povus instrui ilin.

La pli maljuna el la knaboj estis nomata Tomaso Carnes. granda kaj malpala, iom maldika, kaj havis dektri jarojn. La alia, Samuelo Bisbee, estis jaron pli juna, malgranda, tre dika, rughara, kaj havanta rondforman, lentugan vizaĝon. La du faris iom komikan kontraston je apero, sed ili estis tute diligentaj en la postsekvado de anatomia scio, kaj nature ilia komuna gusto faris ilin tre

amikaj.

Unu tagon Samuelo diris al Tomaso "Tomejo, tiu ĉi studado de anatomia libro ne estas tute kontentiga. Ni dissekcu ion, kaj vidu tiujn internajojn pri kiuj ni legas."

"Bone. Kion ni dissekcos?"

"Oni diras ke kato provizas bonegan objekton por anatomia esploro."

"Bonege. Mia fratino havas ĝuste la katon por dissekci. Ĝi ne estas tro grasa, kaj ĝi ne estas bona por io alia. Ni ĝin forportu al la ekspozicia konstruaĵo en la foira kampo, kie ni povas dissekci ĝin kviete. Ni iru tie tiun ĉi posttagmezon."

"Bona ideo. Kiel ni ĝin mortigos?" "Ni povus frakasi la kranion per bastono"

"Sed, Tomĉjo, tio difektus la cerbon, kaj mi deziras speciale pristudi la cerbon."

"Do vi eble povus tranci ĝian gor-

gon per skalpelo."

"Vi intencas diri ke vi trancos ĝian gorgon."

"Nu, ne, Samĉjo. Mi opinias ke vi

bezonas la praktikon."

"Mi tute ne bezonas la praktikon. Krome vi estas pli granda ol mi, kaj vi povas fari la aferon pli bone. La besto eble koleriĝus kaj fariĝus malafabla kontraŭ mi."

"Do mi venenu ĝin."

"Bone. Tio estos la pli bona maniero Per kia veneno?"

"Oni diras ke striknino estas multe uzata por venenado de bestoj."

"Do ni uzos strikninon. Mi ĝin ricevos ĉe la apoteko de Harley, kaj vi iru kaj kaptu la katon. Kiom da striknino ni bezonas?"

"Ho, mi dirus ĉirkaŭ la valoro de dek cendoj. Kiam vi ĝin ricevos, venu kase post la ĉevalejo de mia patro, kaj ni ekiros al la foira kampo. Cu vi havas vian skalpelon en bona sta-

Samejo elprenis el sia poŝo trancil-

on kaj montris la klingon.

"Mi vetos ke ĝi estas pli akra ol via. Gi povas distranĉi haron."

"Oni povus sin razi per la mia," diris Tomĉjo. "Ho, Samĉjo, mi preskaŭ forgesis. Ne aĉetu la strikninon de Luman Pike."

Sed kiam Samcjo alvenis al la apoteko, li trovis Lumanon sola en la magazeno, sidanta sur la vendotablo kaj mortiganta muŝojn per mezurilo. Luman, la helpanto de Sinjoro Harley, estis granda maldika junulo kun malgaja vizaĝo, sed fama pro liaj ŝercoj.

"Bonvenu, Sinjoro Bisbee," diris Luman, kiam Samcjo eniris; "cu mi povas al vi vendi botelon de la fama len-

tugforprenilo de Harley?"

"Ne, vi ne povas," diris Samčjo kun alta indeco. "Mi volas ačeti strikninon por dek cendoj."

"Kion?" kriegis Luman. "Cu miaj

oreloj aŭdas korekte?"

"Mi volas aĉeti strikninon por dek

cendoj," ripetis Samĉjo firme.

"Dio nin savu," kriis Luman; "ĉu vi scias ke striknino estas perforta veneno? Ĉu vi scias ke unucenda valoro da ĝi metata sur via lango mortigus hundon?"

"Mi scias ćion koncerne ĝin," diris Samĉjo, "kaj mi al vi dankus se vi rapidigus viajn mallaboremajn ostojn kaj

donus gin al mi."

"Ho, ĉielo," diris Luman, kvazaŭ al si mem parolanta, "ĉu estas eble ke tiu ĉi bonega juna viro meditas memdetruon? Ĉu estas eble ke la doloregoj de amo rifuzita aŭ la malkontentiĝo pro ambicioj frakasitaj naŭzigis lin je vivado? Mia kara Sinjoro Bisbee," li daŭrigis, "mi bedaŭras ĝin diri, sed la leĝo severe malpermesas vendi strikninon al memmortigonto."

"Cesigu vian sensencaĵon, Luman. Mi volas ricevi ĝin por scienca celo."

"Ho, kial je la nomo de ĉielo vi ne diris tion antaŭe?" Kaj Luman kuris en proksiman ĉambron, kaj baldaŭ revenis portante malgrandan boteleton plena je blanka pulvoro.

"Mia kara Sinjoro Bisbee," li diris kun ĝentila saluto, kiam Samĉjo metis dek kuprajn monerojn sur la vendotablo, "permesu al mi deziri al vi la plej grandan sukceson je viaj sciencaj la-

boroj."

Samcjo rapidis al la kunvenejo post la cevalejo de Sinjoro Carnes, kie li trovis Tomcjon, dum sur la tero kusis movanta kaj miaŭanta sako.

"Vi kaptis la katon, ĉu ne?" li diris.

"Jes, kaj mi havis dolĉan laboron konvinkante ĝin en la sakon. Ĉu vi ricevis la strikninon?"

Samĉjo montris la boteleton, kaj ili ekiris trans kampojn al la foira kampo,

duonmejlon for, kie en la aŭtunoj estis montritaj la ekspozicioj de la terkulturistoj de Littledale kaj la ĉirkaŭantaj urboj.

'Tomê o," diris Samêjo, post kiam ili iris mallongan d stancon, "ĉu vi pensas ke oni povas iam trovi ĝuste

kie loĝas la animo?"

"Nu," diris Tomĉjo, "mi pensas ke ĝi estas en la cerbo, sed mi ne kredas ke oni povus atingi ĝin per la skalpelo."

"Kompreneble ne. Sed antaŭ kelkaj tagoj mi legis ke iuj filozofoj pensas ke la menso kunetendas kun la tuta nerva sistemo, tial ke ĝi kuŝas sar la supraĵo de la korpo tiom kiom en la cerbo. Kion vi pensas pri tio?"

'Sajnas racie. Cu tiuokaze granda knabo ne havus pli multe da menso ol malgranda?" Kaj Tomĉjo malsu-

prenr gardis Samejon.

"Ne necese. Ĝi povus etendiĝi maldika sur la granda knabo; kelkfoje treege maldika." Kaj Samĉjo supren-

rigardis Toméjon.

T'el diskutante altajn temojn ili alvenis al la foira kampo, kie truo en la ĉirkaŭbarilo permesis al ili trarampi. Ili trovis neŝlosita la pordon de la fojnejsimila domo ekspozicia, kaj demetanta sur la planko la protestantan sakon ili pretiĝis por la anatomia laboro.

"Nu, Samejo," diris Tomejo, "mi tenos la beston inter miaj genuoj kaj ellasos ĝian kapon el la sakon, kaj vi metu iom de la veneno sur ĝian langon. Ĝi devus esti senviva post min-

uto eble."

Samcjo lerte skuis ĉirkaŭ duonon de la enhavo de la boteleto en la buŝon de la krianta besto. Tuj ĝi elmetis kriegon akran kaj komencis fortege barakti.

"Rapidu, Samcjo, kaj kaptu la demonon! Ĝi disŝiras miajn krurojn tute

en pecojn!"

Sed antaŭ ol Samcjo povus fari ion la freneza besto forŝiris sin el la sakon kaj la teno de Tomcjo, saltis supren al trabo super iliajn kapojn, kaj el senvitra fenestreto sub la tegmenta frontono.

Okazis ke Sinjorino Burke, kies edzo estas la zorgisto de la foira kampo,
vid s el sia fenestro la du knabojn irantaj trans la kampon. Ŝia scivolo est s vekita, kaj ŝi decidis viziti ilin por
vidi tion kion ili faras. Ŝi ĵus estis apude al la domo kiam la indignigita kato elsaltis el la fenestreto. Iliaj or-

bitoj interfrapegis. La fluganta kato renkontis la ŝultron de Sinjorino Burke, kie ĝiaj ungoj pikis profunde, kaj de kie ĝi saltis teren kaj forkuris kiel strio de pelta fulmo. Sinjorino Burke laŭte kriegis. La knaboj konsternitaj elkuris el la konstruaĵo.

"S'njorino Burke!" ekkriis ili, "Kio

estas? Cu vi vidis katon?"

"Jes, mi vidis, kaj mi ankaŭ sentis ĝin. Ĝi gratis mian ŝultron terure."

"Ni bedaŭras. Kien iris la besto?"

"Mi ne scias. Kion vi faras ĉi tie?"

"Ni faras eksperimenton sciencan."

S'njorino Burke enir's en la konstruajon, dum la knaboj ĉirkaŭrigardis

por vidi la katon.

"La besto ne povus iri tre malproksime," diris Tomĉjo. "Ĝi certe devas nun esti senviva. Vi donis al ĝi sufice da striknino por mortigi kvardek

katojn."

Subite penso venis al ili ambaŭ. Ili kuris en la domon, kie ili vidis Sinjorinon Burke forprenanta la boteleton de siaj lipoj, kun esprimo de malaprobo sur la vizaĝo.

"Ho, elkracu ĝin, elkracu ĝin! Estas mortiga veneno!" ili ekkriegis kun

palaj vizagoj.

Sinjorino Burke elmetis akran kri-

on.

"Ho, Sankta Virĝulino," ŝi ploris; "ho, ke mi devis vivi por vidi min senviva pro veneno! Kuru, rapidu por venigi la pastron kaj la kuraciston! Ho, kial mi iam gustumis la malpuran acidaĵon?"

"Acida?" demandis Samĉjo, dum brilo de espero aperis sur sia vizaĝo. "Se ĝi estas acida ĝi ne estas striknino. Eble ĝi ne estas veneno. Lasu

min vidi."

Li malsekigis fingron, faligis sur ĝi iomete de la pulvoro kaj tuŝis sian

langon per ĝi.

"Aj!" li ekkriis kun grimaco, "ĝi estas pli acida ol vinagro. Ĝi tute ne estas striknino. Striknino estas treege maldolĉa."

"Samcjo, cu vi acetis tiun materion de Sinjoro Harley?" demandis Tom-

ĉio.

"Ne, li ne estis en la magazeno. Mi ĝin ricevis de Luman Pike. Li faris grandan aferon pri ĝi antaŭ ol li donis ĝin al mi."

"Nu, vi estis mokata. Vi devus scii

ke tiu ŝercisto vin trompus."

"Tondro!" diris Samĉjo, la okuloj brilaj per koloro. "Nur atendu iomete, kaj mi al li pagos, la malaltbrovita kanajlo!"

Sinjorino Burke baldaŭ trankviliĝis de sia teruro, kaj al ŝiaj demandoj la knaboj konfesis siajn anatomiajn intencojn kaj malsukceson. Ŝi ridis kaj diris al ili iam ankoraŭ peni, kaj ŝi provizos katon.

Tomĉjo iris hejmen, sed Samĉjo, kun varmega kolero en la koro, decidis tuj ricevi kontentigon el la perfi-

da Luman.

Li eniris en la apotekon. Luman, ankoraŭ sola, sidis sur la vendotablo,

fajfante "Yankee Doodle."

"Vi kanajla trompulo!" ekkriis la indignigita Samĉjo, "kial vi al mi donis tiun acidan materion kiam mi postulis strikninon?"

Luman saltis plankon kaj jetis supren la manojn kun tragedia mieno.

"Dio mia!" li ekkriis, "ĉu miaj plej malbonaj timoj efektiviĝis? Ĉu vi intencas al mi diri ke vi gustumis tiun materion mortigan?"

"Mi ne kredas ke funto da ĝi mal-

utilus-"

"Ho, mia malfelica knabo!" interrompis Luman. "Sed eble ne estas tro malfrue por savi al la mondo vian viv-

on valoran. Ni rapidu."

Elpafante sian longan brakon li levis la koleran knabon kaj portis lin al la vendotablo kaj kuŝiĝis lin. Tiam atingante al breton li prenis suĉbotelon infanan kaj penis enŝovi ĝian kaŭĉukan pinton en la buŝon de la fortike baraktanta Samĉjo.

"Kvietiĝu, Samĉjo, kvietiĝu. Se nur ni povas malplenigi vian stomakon de la veneno, vi estos savita, kaj mi kaj ĉiuj aliaj viaj multaj amikoj fariĝos

tiel treege felicaj!"

Jus je tiu tempo eniris virino.

"Ho, Sinjorino Blake," diris Luman, lasante Samĉjon, "vi kunportas kun vi la lumon de ĉielo kaj feliĉigas min per la espero ke mi povas iel servi al vi."

"Luman Pike, kion vi faras al tiu

knabo?"

"Ho, nenion speciale. Mi nur estis savanta lian vivon. Sed kompreneble mi povas prokrasti tion ĝis viaj deziroj kontentiĝos."

"Sed kio estas ĉe li?"

"Nu, la malfeliculo penis sin mortigi gustumante acidon tartrikan."

Dume Samĉjo estas ĉe la pordo. Lia kontentiĝo ne estis akirita, sed li ekscias kial la anatomia esploro malsukcesis.

#### NOVA METODO DE ANESTEZO SEN DROGAĴOJ

En la ĉeesto de dudek kvar eminentaj ĥirurgoj de Hartford, Conn. (Usono) D-ro W. H. Fitzgerald fresdate primontris novan anestezon ĉe loka hospitalo. Oni unuvoĉe esprimis opinion, ke verŝajne la eltrovo revoluciigos nunajn metodojn de ĥirurgio.

D-ro Fitzgerald operaciis je pluraj pacientoj, uzante en neniu okazo drogojn, gason aŭ kokaino. Li aplikis premon sur la nervojn tra la nazo aŭ gorĝo, agante, li klarigis, laŭ konata fakto, ke ekzistas iuj speciale sent-regaj nervokampoj, sur kiujn premo tuj ĉesigas doloron. Unuokaze li anestezis manon de virino, tiel ke oni puŝis pinglojn en la karnon, ne kaŭzante eĉ la plej malgrandan doloron.

Ĉe alia homo oni anestezis piedon kaj faris en ĝin dek kvin entranĉojn. Du dentojn oni sendolore eltiris. Jen plue, post anestezado, la kuracisto trapikis timpanon, kaj la paciento ne sentis. Trapiki timpanon oni rigardas ki-

el plej doloran operacion.

Alia pruvo estis ankoraŭ pli miriga. La ĥirurgo forigis fremdan aĵon el okulo de kuracato kaj poste tiretis skalpelon trans la okulglobon, kaj la

kuracato ne ektremis.

Tiu primontrado de D-ro Fitzgerald estis sekvo de alia, kiun li faris ĉe la malsanulejo en Hartford antaŭnelonge, per kiu li montris la preparajn pasojn por uzado de l'metodo. En la prepara kliniko oni montris, interalie, ke specialaj premadoj sur la gorĝon naskas sentojn, ekzemple varmon aŭ senpezecon, en diversaj partoj de la korpo, kaj oni elpruvis ke dolorego

ĉie estas faciligebla rapide per sim-

pla premado.

Oni konstatas kelkajn profitojn el la uzado de tia "refleksa" anestezo. Antaŭ ĉio, la danĝeroj de la etero estas evitataj. Malgraŭ la generala uzado de ĉi tiu, multaj riskoj venas de ĝia utiligo, esceptinte en la manoj de eksperto.

En la okazo de negravaj operacioj, ekzemple eltiro de fremdaj aĵoj el la korpo, uzado de tia loka anestezo evitigas dudek-minutan peretera antaŭ-preparado, kiam la operacio mem oku-

pas nur tridek sekundojn.

Ke korpomembro perdas sentpovon post longa surpremado, tion la medicinistaro konas jam de multaj jaroj. Cetere, tia premado estas iufoje sekvata de paralizo, pli-malpli daŭra. Aplikado de tiu premideo al lokaj organoj kiel okulo kaj orelo estas provo nova.

La anestezmetodo praktikata de D-ro Fitzgerald baziĝas sur la konata fakto, ke ekzistas en la nazo, gorĝo kaj buŝo lokoj alte sentemaj kaj enhavantai delikatajn kaj komplikitajn nervfiniĝojn. Per studado pri tiuj ĉi ejoj D-ro Fitzgerald ellaboris sian eltrovon, kies aplikmetodon li primontris tiel mirige ĉe la kliniko.

D-ro Fitzgerald estas naskito de Middletown, Conn. Li diplomiĝis ĉe la Universitato de Vermont, oficis tri jarojn en la Bostona Urbhospitalo kaj studis kvar jarojn en Eŭropo. Li estas ofta kontribuanto al la kuracistaj

revuoj.

Trad. Herbert M. Scott

Suldato—Aŭskultu, amiko, ĉu vi memoras ke mi pruntedonis al vi dek dolarojn antaŭ ses monatoj?

Suldanto—Jes.

Suldato-Kaj vi diris, ke vi deziras havi la monon nur mallongan tempon.

Suldanto-Mi diris la veron. Mi ĝin tenos nur dudek minutojn.

-Trad. Ho Ho

Li-Kompreneble, Gertrudo, nia fianciĝo efektive devos resti sekreto.

Si-Ho, certe. Mi nepre diros tion al ĉiuj. -Trad. Ho Ho

#### STRANGAĴOJ

#### El "World Almanac"-1915

Kuracistoj priskribas kiel maloftan kaj rimarkindan ekzemplon de "stanmalsano" tiun de kvinjara knabino en Filadelfio, en kies kapo oni povas klare aŭdi sonon kiu similas la tiktakon de poŝhorloĝo. (Sendube ŝi havas radojn en la kapo.—La Trad.)

Operacio, kiu —oni diras— estas la unua de sia speco estis farata de D-ro D. F. Reeder ĉe Ancon Hospitalo, Panama, je D. W. MacCormack, Liu estis rompinta timpanon. La doktoro prenis la ŝeleton el la interno de freŝa ovŝelo, kaj kovris la rompitan membranon per ĝi. Post 48 horoj oni formovis la ŝeleton kaj trovis ke la membrano de la timpano denove unuiĝis.

E. Harper de Norda Roseburg, Ore., posedas bovidon kiu havas nur tri krurojn. La besto havas nur unu antaŭan kruron, kiu estas pli granda ol la kruro de ordinara bovido.

S-ino Annie Olson translokigis ĉiun sian meblaron el Seattle, Wash., per la paketpoŝto.

Sep-jarulo, Harold Lutzk de Atlanta, Ga., rigardas ĉiun objekton renverse same kiel ordinara homo rigardus ĝin per spegulo.

Akcipitro, larĝa po kvin futoj de flugilfino ĝis flugilfino, estis kaptata de S-ro J. F. King, Ocilla, Ga.

Betsy Green, grasa negrino, el Kansas City, Mo., staris apud grasulo ĉe la stacidomo. Subite ventekblovo ekkaptis la ĉapelon de la viro kaj forpelis ĝin laŭ la strato. Li kursekvis la ĉapelon, tiel rapide kiel lia graseco permesus. Betsy ridis kaj ridegis dum horo kaj kvardek minutoj kaj ne povis ĉesi. Oni alvokis ambulancon.

Trad. Anoj de la Bostona Esp. Soc.

Just before going to press we have received the following appalling news:

London, 10th Jan., 1916.

Dear Samideano:

It is with profound regret that we have to announce the death of our esteemed President, Captain H. Bolingbroke Mudie, in France.

With other officers he was returning to camp by motorcar on the evening of 6th inst. when in crossing the railway at a level crossing the car was struck by an overdue express train and Captain Mudie and two other officers were killed instantly. \*\*\*

Yours sincerely,
(Signed) E. A. Allsop,
Acting Secretary.

To the stricken British samideanoj, Amerika Esperantisto in behalf of all the Esperantists of North America, extends the deepest sympathy in this time of bereavement. Lia spirito restu kun ni!

THE EDITORS.

#### PENSOJ POR LA SUPERJARO

Estis belega vespero, kaj Johano kaj Mario promenadis sub la lumo de la steloj. Venkita per la ensorĉo de la nokto, li diris: "Mario, ĉu vi edziniĝos je mi?"

"Jes, Johano" ŝi respondis dolĉe. Johano poste silentis dum tiel longa tempo ke Mario zorge demandis: "Karulo, kial vi nenion diras?"

"Mi opinias," respondis Johano, "ke mi jam tro multe diris."
—A.W.L.

"Mi aŭdas ke vi havas kolegian gradiĝinton kiel kuristinon. Ĉu tio ne estas iom multekosta?"

"Ne. Ši laboras por sia nutrado kai vestajoj."

"Kial ŝi faras tion?"

"Si estas mia edzino." -W.H.H.

"Fraŭlino Etelo," li komencis, "aŭ Etelo, mi volas diri—mi konas vin sufiĉe longe por ellasi la 'fraŭlino', ĉu ne?"

kaj signifa rigardo. "Jes, mi opinias ke jes," ŝi diris. "Kiun prefikson vi volas anstataŭi?" —W.H.H.

Nell—Elizo iris al la astrologiisto por ekscii kiam estas la plej bona tempo por edziniĝi.

Stell-Kion li diris al ŝi?

Nell—Li ekrigardis sin kaj diris al ŝi ke ŝi profitu per la unua oportuna okazo. —W.H.H.

#### NOVA GAZETO

La Babilanto. Kiam multaj el niaj periodaj eldonaĵoj malfortiĝas, maldaŭras,—eĉ mortas, estas kontentige anonci la naskiĝon de nova infano, precipe kiam ĝi estas tiel bela kaj tiel forta bubo kiel "Bab."

En Montpelier, Vermont, estas Samideano kiu anstataŭ muskoloj havas risortojn; kies koron anstataŭas dinamo; kaj kiun movigas elektro. Li nek manĝas, nek dormas; nur fumas kaj laboras.

Antaŭ nelonge mi skribis pri lia eldonado de kelkaj broŝuretoj, kaj nun al tiuj oni povas aldoni regule aperantan gazeton, kies redaktoro, kompostisto, pruvlegisto, presisto kaj distribuanto li ankaŭ estas.

Pri ekstera beleco kaj zorgplena preparado "Bab" superas al multaj el la pli malnovaj gazetoj. Koncerne ĝian enhavon vi devus juĝi, ĉar preskaŭ ĉiu Esperantisto en Usono, kaj multaj el fremdaj landoj jam ricevis senpagan proponon esti legantoj de ĝi.

Se ĝi estas bona vi certe devus legi ĝin; se malbona des pli vi devus
koni ĝin por ke vi povu kritiki kaj
kompati la malsaĝulon kiu kredas sin
redaktoro.

—Ko Fo.

#### Kiel Ili Faris Ĝin

Maljuna kamparano kaj lia edzino loĝis apud la vilaĝa preĝejo. Unu varman dimanĉon, vespere, ili sidis sur la perono kaj la griloj laŭte ekbruis. "Mi tre ŝatas tian pepan bruon" dormeme diris la maljunulo kaj tuj ekdormis.

Baldaŭ poste la preĝeja ĥoro ekkantis belan himnon.

"Aŭskultu" kriis la edzino, "ĉu ĝi ne estas belega?"

"Jes," dormeme murmuris la kamparano, "ili faras ĝin per la malantaŭaj kruroj."

Tradukis F-ino M. Wadsworth

#### FOR 60 c.

(Sm. 1,250) we will send to you,

1 CONGRESS BADGE \$ .35
20 EXPOSITION POSTALS
IN ESPERANTO .15
20 CALIFORNIA POSTALS
IN ESPERANTO .15
1 48 PAGE ESPERANTO GUIDE
BOOK OF SAN FRANCISCO AND VICINITY .05

The above prices are 30% below actual cost

#### THE KALIFORNIA ESPERANTISTA RONDARO

946 Central Ave., SAN FRANCISCO, CALIF. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista

#### THE WRITER'S MONTHLY

A Monthly Magazine of Interest to Literary Folks

\$1.00 Yearly

#### THE WRITER'S MONTHLY

SPRINGFIELD, MASS.

# REMEMBER "Editorially Speaking": Subscription to AMERIKA ESPERAN-TISTO is still \$1.00 a year.

ORDER BLANK

#### The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass. Please send me at once, the items checked below, for which I enclose the sum of \$..... Name ..... Address ..... Year's subscription to the monthly magazine, AMERIKA ESPERANTISTO, \$1.00 COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), with vocabularies, \$1.25 postpaid Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with copy of COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, \$2.00 STUDENTS COMPLETE TEXT BOOK (O'Connor), cloth, 50 cents PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), 50 cents

Send me also the following literature as shown in your

book-list:

## AT LAST! the "E" BADGE! \\ \times \times The Best Yet \times \\ \times

Excellent quality green enamel star, with gold-plated back—either brooch pin or lapel button with patent screw fastener. Letter E in gold.

A STRIKING AND BEAUTIFUL INSIGNIA'
Which May and Should Be Worn at All Times
POSTPAID 35 CENTS

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc. WEST NEWTON, MASS.

## 

## FOR THE BEGINNER

A list of text-books and literature suitable for the NEW ESPE-RANTIST STUDENT. Carefully selected and especially recommended:

## Practical Grammar of the International Language

(Ivy Kellerman Reed, Ph. D.)

The new text-book that is "just what you have been waiting for"

## 50 CENTS

Complete Grammar of Esperanto (Kellerman) cloth, Student's Complete Text-Book (O'Connor) cloth, Esperanto at a Glance (Privat) Primer of Esperanto (O'Connor) Introduction to Esperanto (Baker) La Esperanta Kunulo (Wood) Handy Pocket Vocabulary (O'Connor) English-Esperanto Dictionary (Harris) English-Esperanto Dictionary (Hayes-O'Connor) Tra la Jaro (Waddy) cloth, Tutmonda Lernolibro	\$1.25 .50 .15 .10 .05 .25 .10 .25	Ekzercaro (Zamenhof) Aladin aŭ la Mirinda Lampo (Cox) Ala Baba kaj la 40 Rabistoj (Cox) Elektitaj Fabeloj (la Fontaine) El Komedioj (Zamenhof) Gis la Revido (English & Esperanto) Karlo (Privat) Kolomba Premio (Dumas) Mopso de lia Onklo (Chase) Patrino Anserino (Stoner) Princo Vanc' (Bates-Harris) cloth, gold-stamped, Rakonto kaj Aventuro (Hall-Barroll) Sep Ridoj (Wendell)	.35 .18 .14 .18 .10 .05 .15 .10 .15 .35 .75 .10 .25
Fundamento de Esperanto (Zamenhof) cloth,		Sub la Meznokta Suno (Wendell) cloth,	.35

DETAILED DESCRIPTION OF ANY BOOK LISTED FURNISHED UPON REQUEST

## THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.

WEST NEWTON, MASS.

### A COURSE IN ESPERANTO

By IVY KELLERMAN REED, L.L.B, A.M., Ph.D.

READ

#### THE WASHINGTON COURIER

Published Every Saturday

15 cents a copy, Five Dollars a Year

A National Weekly edited by men and women, who tell you what you want to know, in the way you want to read it.

Special trial offer to readers of the American Esperantist: THREE MONTHS FOR ONE DOLLAR

#### WASHINGTON COURIER

Munsey Building, - Washington, D. C.

#### DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

S-ro F. W. Spencer, Blackloam, B. C., Can. 1 S-ro P. At. Kolev, 46 str. Regentska, Sofio, Bulgaria. Pri kulturado de abeloj, kokoj, kunikloj, ktp.

S-ro Emil Lelievre, Bureau des Renseiquements, 37e, Reg. d'Infant, Troyes, Francujo.

S-ro Sebastian Chaler, S. Mariano 124, Tarrasa, Spain.

S-ro Armand B. Coigne, 243 Bedford Pk. Bvd. New York, N. Y., sercas angle kaj esperante rakontojn de diversspecaj abnormalaj psikaj spertoj.

S-ro G. B. Corgnali, Udine, Italy, I.P.K., Esp.

S-ro Aurique Alberich, str. Bartoit No. 9, Tarrasa, Spain.

S-ro Domingo Garcia, Calle, del. Valle No. 9, Tarrasa, Spain.

S-ro V. N. Kossizin, Cigirin kaja 3, Blagovescensk, Na. Amur, Siberia-Russia.

S-ro A. A. Flink, Bol. Sakimanka, 10a Gimnazio, Moskva, Russia. P.I., I., P.M.

F-ino Pacaud, 22-jara, Maison 5, L. 13, Tverskaia, Dolgoroukovski per, Moskva, Rus. 1

Čiuj Amerikaj nomoj kiuj aperas sub ĉi tiu rubriko aperas ankaŭ senpage en "Kata-luna Esperantisto" (Barcelona, Hispanujo), per specia'a aranĝado kun tiu administracio. Tiamaniere ni donas al niaj amikoj bonegan metodon por akiri plenan liston da korespondantoj, preskaŭ senpage.

Spain

S-ro F. S. Cendra, Palafrugell (Gerona) S-ro J. Llavia, Padro Petit, 3, Palafrugell S-ro J. Ramirez, Martin de Vargas, 15, 2,

Madrid S-ro J. Oro, Sant Vicens de Torello (Barce-

lona) Grupanoj de Fervojista Stelo, Princesa, 50,

Barcelona, S-ro Jaime Vilalta, Pl. Catalunya, 6, Reus, (Tarragona)

S-ro M. Sorolla Sanchez, str. Tantarantana, 11, 2o. Barcelona.

#### MONOGRAM EMBOSSER

Handy, compact, distinctive neat everlasting. An ideal gift at any time. One or two letters, 25 cts. Leahy's, Bx. 264, Alexandria. Va.

#### MICRATING CARDS!!!

25 FOR 25 cts. 6 FOR 10 cts. E. H. BECKER 332 Third Ave., Dayton, Ky.

## "LA ONDO DE ESPERANTO"

monata ilustrata ĵurnalo, eldonata en Ruslando

#### 1916-VIII-a-jaro

La ĵurnalo aperas akurate la 1-n daton novstile. Ciu kajero havas 16-24 paĝojn. Formato 17x26 cm. La kunlaboradon partoprenas ciulandaj esperantaj verkistoj. Literaturaj konkursoj premiataj. Portretij de konataj Es-perantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bib-

La abonpagon-2 rubloj=2,120 sm.=fr.5.35 =mk. 4,32, kr. 5,02, 4 sil. 3 p., 2,65 gul., sved. kr. 3,84, 1.03 dol. (laŭ la posta internacia konvencio)-oni sendu al Moskva Librejo "Esperanto" (Moskvo, Lubjanskij pr. 3, Ruslando) postmandate, papermone, bankĉeke aŭ pere de enlandaj esperantaj librejoj.

liografio. Amuza fako. Koresponda fako. Por progresigi la esperantan sciencan literaturon la jurnalo senpage donos al la abonantoj en la jaro 1916 1-an parton de granda, 360 paga, populare-scienca verko de Profesoro de Moskva Universitato K. A. Timirjazjev. "LA VIVO DE KRESKAĴOJ"

Tradukità de Doktoro Andreo Fiser

Car dum la milito la postmandata institucio ne funkcias, la eksterlandanoj tre oportune povas aboni al la jurnalo, sen kurza perdo kaj multaj poŝtelspezoj, sendante 17 respondkuponojn en rekomendita letero.

La anonco en Koresponda fako kostas 30 kop. aŭ 3 respondkuponojn.



## LA "EMERSON" AŬTOMATA

La celo de la Ludigilo-Fortepiano—perfekta reproduktado de manludado—efektiviĝas per la "Emerson" Aŭtomata, la plej nova, la plej arta kaj homa el Ludigilo-Fortepianoj.

De la Aŭtomata, oni ricevas la impreson pri artistaj manoj ludantaj la klavojn. "La Meĥanika Tuŝado" malaperis.

Ĝi *reproduktas* la interpretadojn de la bonkonataj muzikistoj same kiel ili mem ludis tian kompozicion.

La "Accompano"—nova kaj mirinda elpensaĵo—ebligas ke oni regulu kaj dividu la muzikon de iom da distanco. Kiel montrata per la bildo la kantistino ludas sian propran akompanon. Per iomete da sperto oni povas ludi la akompanon tiamaniere pli bone ol permane.

La sperto estas la via tiel baldaŭ kiel vi volas—ĉe iu "Emerson" a vendisto.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj Petu katalogon

## EMERSON PIANO COMPANY

(Fondita 1849)

BOSTON, - MASS.